Triesta Esperanto-Asocio

lancxas
la 4an Internacian Konkurson
jaro 2010 pri la temo:

Kristnaska Poezio

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun agxo de 6 gxis 14 jaroj, kiuj sendu, gxis la **15ª de novembro 2010**, siajn verkojn al la jena adreso:

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Via del Coroneo 15—IT-34133 TRIESTE—Italia

Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aux pli da faritajxoj laux la kategorio:

Kat. 1) Desegnajxo (ekz: “kiel mi imagas tiun tradician feston”, “la Kristnaska Kripo”, “familia festo”);

Kat. 2) Rakonto aux poeziajxo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas gxin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aux poeziajxo pri kripo, pri la naskigxo de Jesuo, kristnaska fabelo, …);

Kat. 3) Manfaritajxo (el gipso, ligno, metalo aux papero, aux el iu ajn alia materialo).

La jxurio atribuos al Kat. 2) aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu cxi brancxo.

La “rakonto” aux “poeziajxo” estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la auxtoro, kaj cxiuj aliaj faritajxoj estu akompanataj de frazo aux komentario en ambaux lingvoj.

Por cxiu verko estu ankaux indikitaj:

- persona kaj familia nomoj;
- agxo;
- lernejo kaj klaso;
- posxta adreso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la auxtoro.

CXiuj konkursajxoj prezentigxos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj cxi aldonigxos al la poentoj de la jxurio.

Oni anoncos la premiitojn, laux kategorio kaj agxo (de 6 gxis 8 jaroj [A]; de 9 gxis 11 jaroj [B]; de 12 gxis 14 jaroj [C]) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aux testudo.ts@gmail.it